

# FABELOJ DE LA VERDA PIGO

KOLEKTITAJ DE LOUIS BEUCAIRE



*Fabeloj de la verda  
pigo*

*Kolektitaj de Louis Beaucaire*

*kaj*

*ilustritaj de Stano Markovič*

# *Fabeloj de la verda pigo*

## *Eldono de Flandra Esperanto-Ligo*

Tiu ĉi (nekompleta) bitlibro rajtas esti  
kopiita senkoste kaj transdonita al kiu ajn.



# *ANTAŬBABILO*

Saluton, karaj infanoj! Sidiĝu en la herbo kaj streĉu la orelojn.

Ha! kiel bonŝancaj vi estas, hometoj! Vi povas iri en la lernejon, legi librojn, rigardi la televidon kaj tiamaniere amasigi mil sciojn necesajn por viaj venontaj jaroj.

Verdire, mi ne plendas pri mia piga sorto. Male. Mi spertis multon dum mia longa vivo. Mia avo naskiĝis en pola arbaro kaj lernis Esperanton de klera onklo loĝanta en Bjalistoko. Mia patro, migrema birdo, konatiĝis kun mia patrino en via bela vojevodio. Tie, meze de vepro, mi iam elrampis el verde bruna ovo kiel denaska esperantista pigo. Mia patro volonte raportis pri siaj vojaĝoj kaj vespere mia patrino rakontis al mi fabelojn.

Jam de longe mi nestas supre de ĉi tiu poplo, ĉirkaŭ kies trunko vi nun sidas, por aŭskulti mian babiladon. Iafoje min vizitas miaj kuzoj, la saĝa Lanio, kiu studis la

filozofion en Ateno, kaj Hematopo, kiu kolektas klaĉojn laŭlonge de foraj plaĝoj. Tiel mi informiĝas pri ĉiuj gravaj okazaĵoj en la vasta mondo.

Krome mi ofte paŭzas sur branĉo de platano, meze de la lerneja korto. Kiam la suno brilas, la fenestroj estas malfermitaj, kaj mi parkerigas ĉion, kion via instruisto, s-ro Rojelo, provas enkapigi al vi pri gramatiko, geografio, historio, poezio, muziko... Jes, mi eĉ kapablas kanti, eble ne tre melodie pro mia aĝo, sed sufiĉe raŭke por plaĉi al la moderna junularo. Tio cetere klarigas mian alnomon. Kutime pigo estas nigra kaj blanka, sed neniam verda, ĉu jes? Nu, pro miaj lingvaj konoj, oni petis min partopreni en la Arta Vespero de la 44a Universala Kongreso. Tie mi tiel emocie kantis la tri strofojn de la Himno, ke oni rekompence donacis al mi jenan verdan stelon tajlitan el bela imitaĵo de smeraldo. De tiam la homoj nomas min

la verda pigo

# *LA MILITO DE LA ÂPELOJ*



FOJE reĝo rigardis sin en spegulo, kiel ĉiumatene post la razado. Rimarkinte ion, kion li ĝis tiam neniam rimarkis, li sonorigis al la ĉambelano.

- Via reĝa moŝto vokis min.

- Jes, alproksimiĝu kaj staru apud mi antaŭ la spegulo. La ĉambelano miris pro la nekutima ordono.

- Sinjoro ĉambelano, ĉu vi rimarkas ion?

- Kion mi rimarku? Via reĝa moŝto estas pli granda, pli bela, pli majesta, pli ...

- Tatata! Rigardu bone.

- Mi rigardas.

- Ĉu vi ne vidas, ke vi, simpla ĉambelano, havas sur la kapo la saman ĉapelon kiel mi?

- Se via reĝa moŝto ordonos tion al mi, mi tuj deprenos mian ĉapelon, sed poste mi estos nur cambelano.

- Ne temas pri tio. Konservu vian simplan ĉapelon. Ĉu tamen ne decus, ke mia propra kapo estu pli lukse vestita ol via? Bonvolu venigi la prezidanton de la Akademio.

Malgraŭ siaj reŭmatismoj la prezidanto de la Akademio galopis al la reĝa palaco.

- Via reĝa moŝto vokis min.

- Jes, sinjoro prezidanto. Bonvolu sidiĝi kaj diri al mi, kiel vi skribas la vorton „reĝo”.

Balbutante, la Akademiestro literumis:



- Ro - e - ĝo - o.
- Kio estas super la tria litero?
- Super la tria litero estas supersigno, via reĝa moŝto.

La regnestro rikanis:

- Supersigno! Kiu inventis tiujn supersignojn?
- D-ro Zamenhof, via reĝa moŝto.
- Ĉu vi ne opinias, ke D-ro Zamenhof iel neglektis la hierarkion?

La prezidanto de la Akademio malfermis la buŝon kaj rigardis sian suverenon per mirrondaj okuloj. La reĝo ekkriis:

- Malbenita estu la Fundamento, kiu donis al reĝo simplan ĉapelon anstataŭ krono! Ĉu vi aŭdas, sinjoro prezidanto? Mi postulas mian kronon. Bonvolu do transdoni al ĉiuj presistoj de mia lando jenajn ordonojn:

1e: De nun oni skribu la vorton „reĝo”, uzante kronon anstataŭ simpla supersigno.

2e: Oni uzu du kronojn por la titolo „reĝa moŝto”.

3e: Oni uzu iom pli malgrandan kronon por la vorto „reĝino”.

La prezidanto de la Akademio riverencis tri fojojn kaj eliris el la palaco. Ne domaĝante siajn reŭmatismojn, li vizitis ĉiujn presistojn de la regno, por konigi al ili la reĝan dekretion.

Oni devis kompreneble fandi novajn tipojn, sed ĉiuj korteganoj akordiĝis, por laŭdi la bonguston de la reĝo kaj trovi la novajn librojn duoble interesaj.

Kiam oni lanĉas modon, multaj homoj volas imiti ĝin. Subite, krom pulĉinelo, kiu opiniis sian konusan ĉapelon belega, neniu estis kontenta pri sia supersigno:

Volis

la ĝardenisto pajlan ĉapelon,  
la ŝipisto maristan ĉapon,  
la ĵurnalisto kvadratitan kaskedon,  
la ĉambristino puntan kufon,  
la ĝendarmo militistan kepon,  
la ĉampano korkon,  
la ĝemelo du supersignojn,  
la ĵonglisto tri aŭ kvar ...

La libroj ĉiam pli beliĝis, sed la laboro de ia kompatindaj presistoj fariĝis tiel komplika, ke pluraj preferis ŝanĝi la metion, antaŭ ol freneziĝi.

La prezidanto de la Akademio deklaris, ke li rezignos sian oficon, se oni plu tedos lin per tia bagatelo. Oni memoru, ke tiu kroma laborado perdigis al li la lastajn tri harojn, kiuj konsistigis lian propran kapornamaĵon.

Ve, la unuavide nur supraĵa tumulto degeneris en klasbatalon kaj eĉ en intercivitanan

militon, kiun la historiistoj nomis „la milito de la ĉapeloj”.

En ĉiuj presejoj de la lando la 22 malriĉaj literoj rifuzis kunlabori kun la 5 riĉaj ĉapelitaj literoj. Ili strikis kaj manifestaciis surstrate kontraŭ la aroganteco de la burĝaj literoj. Ĉi tiuj rimarkigis, ke ili ne kulpas pri sia nobela denaskiteco, kaj ke ili estas nemalhaveblaj por la bona funkciado de la socio. Sufiĉas ja rigardi la ruĝajn afiŝojn de la ribeluloj: „Abocoj el ĉiuj landoj, unuigu!” . Oni devas vole nevole uzi supersignojn. Maldekstraj intelektuloj provis pruvi, ke oni povas verki proletajn skribaĵojn sen supersignoj, kaj la ruĝaj afiŝoj poste tekstis: „Abocoj el la tuta mondo, unuigu viajn fortojn!”.

La aŭtoroj de detektivaj romanoj kaj la gazetistoj protestis, ke oni ne rajtas trudi al ili tian ĵongladon. La intelekta vivo stagnis, sed neniu tendaro volis cedi. La situacio difektiĝis ĉiutage iom pli. Okazis kio devis okazi: terura batalo. De sur la plej alta branĉo de mia poplo mi observis per lorno la movadojn de la korpusoj en la ebenaĵo. Pezaj pafaĵoj hajlis el la linio de la nombre superaj senĉapeluloj: „fiuloj - banditoj - kruduloj - abomenuloj - murdistoj!”. La atakitoj rezistis, firme tenante super si siajn supersignojn kvazaŭ militistajn kaskojn. Kiam

ili kontraŭatakis, sangajn vundojn kaŭzis al la simpluloj la akraj sagopintoj de la cirkumfleksitaj insultoj: „aĥ - fuŝuloj - sovaĝuloj - aĉuloj - apaĉoj!”.

La sorto de la batalo restis nedecidita. Vespere la presistoj devis bandaĝi kontuzojn, tuberojn kaj rompojn de multaj difektitaj literoj.

Por venki tiun ribelon, la reĝo ordonis dungi fremdajn literojn el Francujo, Ĉeĥoslovakujo kaj aliaj barbaraj landoj posedantaj strangajn, minacaspektajn literojn.



- Karaj alfabetanoj, vi formas unu grandan rondon familian, en kiu ne estas riĉaj kaj malriĉaj, belaj kaj malbelaj literoj, sed nur egalaj kunuloj. Gravas ĉiu el vi, kun aŭ sen ĉapelo. Supersignoj ja ne estas frivola galanterio, kiel volis kredigi al ni la reĝo, sed iloj nepre necesaj por la internacia kompreniĝo.

Tondra aplaŭdo substrekis tiujn ardajn vortojn. La literoj lo, i, bo, e, ro kaj a kriis:

- For la tirano!

Ĉiuj kunkriis:

- For! Vivu la demokratio!

La saman tagon la reĝo fuĝis eksterlanden kun sia luksa supersigno sub la brako. La prezidanto de la Akademio fariĝis prezidanto de la respubliko, kaj de tiam la literoj de la Esperanta aboco senĉese kunverkas belegajn tekstojn, antaŭ kiuj la tuta mondo respekte kaj admire demetas la ĉapelon.



# ***LA REVISTO***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be) aŭ de [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)



# ***SAMIDEANO LUPO***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be) aŭ de [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)

# ***MALAPERIS LA FACILA VENTO***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be) aŭ de [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)

***LA BONA FEINO  
AMENTA KAJ  
SINJORO AKUKU***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be) aŭ de [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)

# ***LA VERDA PUNO***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be) aŭ de [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)

# ***LA ETA POETO KAJ LA LOKOMOTIVO***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be) aŭ de [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)

# *LA KAPAŬSKULTILOJ*

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be) aŭ de [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)

# ***LA RIBELEMA KRURO***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be) aŭ de [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)

# ***ZOZO, LA DEKSEPA REGULO DE LA FUNDAMENTO***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be) aŭ de [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)



# ***LA LINGVO INTERPLANEDA***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be) aŭ de [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)

# ***LA STRANGA HISTORIO DE NOTULAS***

Tiu ĉi ĉapitro ne aperas en la provversio de la libro. La plenan version vi povas akiri de [www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be) aŭ de [retbutiko@fel.esperanto.be](mailto:retbutiko@fel.esperanto.be)

# *Kolo fono*

**Titolo:** Fabeloj de la verda pigo

**Aŭtoro:** Louis Beaucaire

**Ilustraĵoj:** Stano Markovič

**ISBN de la papera eldono:** 90-6336-20-7

**VNR:** 17-11-304-392

**Leĝa depono de la presita eldono:**

D/1981/2639/2

Flandra Esperanto-Ligo

Lange Beeldekenstraat 169 - 2060

Antwerpen

[www.retbutiko.be](http://www.retbutiko.be)

© 2023 FEL, Antverpeno

La eldonejo dankas sinjoron Roland Rotsaert pro la konvertado de skanita ekzemplero de la originala presita eldono al bita versio.

Tiu ĉi ekzemplero de *Fabeloj de la  
verda pigo* estas nekompleta eldono por  
informaj celoj. Ĝi rajtas esti kopiita  
senkoste kaj transdonita al kiu ajn.